Mi estas Jesus Moinhos Pardavila (Suso),

el Galegio, Hispanio.

Mi licenciiĝis pri galega filologio ĉe la Universitato de Santiago de Compostela. Eble tio sonas iom strange al vi, tamen temas pri ordinaraj studoj en Galegio. La galega estas varianto de la portugala; ĝi havas oficialan rangon en Galegio, kune kun la tutŝtata hispana lingvo, de la jaro 1981. Do mi estas portugallingvano.

Kompreneble mi scipovas ankaŭ la hispanan, kiun mi tre ŝatas, kaj ankaŭ, diversgrade, la rumanan, la katalunan, la italan, la sardan, la anglan kaj la francan. Mi celas studi Interlingvistikon ĉar mi volas profesiiĝi pri Esperanto, surbaze de miaj antaŭaj filologiaj studoj. Mi firme kredas, ke nur per profesie preparitaj personoj oni povas atingi rekonon de Esperanto en la landaj eduk-sistemoj.

Nun mi transiras malfacilan laboran situacion. Ĉiujare la aŭtonoma registaro de Galegio okazigas kursojn de la galega por prepari plenkreskulojn por tre postulemaj KER-ekzamenoj. Por multaj lernantoj, kiuj ne havis la ŝancon studi la lingvon en mezlernejo, tio estas la sola ebleco kandidatiĝi al oficiala posteno. Mi instruis en tiuj kursoj, sed la registaro ĵus nuligis la instruistajn listojn por ne dungi homojn en epoko de severa krizo.

Mi estas senlabora. Sed plena de projektoj kaj energio! Mi amas lingvistikon kaj literaturon, kaj estas ĝisosta filologo kaj instruisto de la plej bela akvo. Kaj Esperanton mi konsideras mian duan unuan lingvon. Delonge mi revas pri tio, studi Esperanton en universitato. Se mi sukcesus frekventi la kurson de Poznano, tio estus la kulmino de jaroj da strebadoj kaj aspiroj.